

Ulrich Lins

Detlev Blanke kiel movadano

Resumo: La lernejano Detlev Blanke lernis Esperanton aŭtodidakte en 1957. Kiel studento en la Universitato de Rostock li komencis aktivi por la movado, antaŭ ol ĝi estis oficiale permesita. Poste li helpis krei la organizan kadron por Esperanto en GDR. Ekde 1968 li estis sekretario en la Kulturligo, respondeca pri Esperanto. Paralele li dediĉis sin al interlingvistiko kaj Esperantologio (doktoriĝo kaj habilitiĝo en Humboldt-Universitato, Berlino). Dum multaj jaroj li estis por esperantistoj en kaj ekster GDR la ĉefa vizaĝo de la orientgermana movado. Li ĉiam konsciis la cirkonstancojn de fermita ŝtato kaj zorge atentis, ke esperantistoj ne kunpuŝiĝu kun la aŭtoritatoj. Lerte li klopodis ekspluati la ŝancojn de Esperanto en la “niĉo,” kiun la reĝimo allasis. Post la ekrego de Gorbaĉov li komencis transiri al pli (mem)kritika pozicio. En 1990/91, en la procezo de germana reunuiĝo, li kontribuis al la kuniĝo de la okcidenta kaj orienta Esperanto-asocioj en Germanio. En 1991 li kunfondis Societon pri Interlingvistiko, kiun li prezidis dum dudek jaroj.

Ŝlosilvortoj: Esperanto; Interlingvistiko; Internaciismo; Komunismo; GDR; Persekutoj.

Detlev Blanke as Esperanto activist

Abstract: Detlev Blanke taught himself Esperanto as a schoolboy in 1957. As a student at the University of Rostock he became active in the Esperanto movement before such activity was officially permitted. Later, he helped create an organizational structure for Esperanto in the GDR. As of 1968 he was the secretary in the Cultural League responsible for Esperanto. At the same time, he dedicated himself to interlinguistics and Esperantology (with a doctorate and habilitation from Humboldt University, Berlin). For many years he was the principal face of the East German Esperanto movement both inside and outside the GDR. He was always aware of the situation of a closed country, and took pains to ensure that Esperantists did not collide with the authorities. At the same time, he skilfully sought to exploit the chances of Esperanto in the “niche” that the regime allowed. Following Gorbachev’s ascent to power he began to shift to a more (self-) critical position. In 1990-91, in the process of German reunification, he contributed to combining the Esperanto associations of the German east and west. In 1991 he was one of the founders of the Society for Interlinguistics, over which he presided for twenty years.

Keywords: Esperanto; Interlinguistics; Internationalism; Communism; GDR; Persecutions.

Detlev Blanke und die Esperanto-Bewegung

Zusammenfassung: Detlev Blanke hatte 1957 als Schüler Esperanto im Selbstunterricht gelernt. Während seines Studiums an der Universität Rostock wurde er für die Esperantobewegung schon aktiv, bevor diese offiziell zugelassen war. Von 1968 an war er im Kulturbund als hauptamtlicher Sekretär für Esperanto tätig. Parallel zum organisatorischen Wirken widmete er sich dem Esperanto in seiner wissenschaftlichen Arbeit (Promotion 1976, Habilitation 1985, beide an der Humboldt-Universität Berlin), was ihm internationale Anerkennung als Interlinguist einbrachte. Für Esperantisten inner- und außerhalb der DDR war er viele Jahre lang das Gesicht der ostdeutschen Esperantobewegung. Ihm waren die Rahmenbedingungen in der abgeschlossenen DDR stets bewusst; sorgsam achtete er auf die Vermeidung von Konflikten zwischen den Esperantisten und staatlichen Stellen. Geschickt nutzte er die Chancen, die sich dem Esperanto in der vom Staat gewährten „Nische“ boten. Unter Gorbatschow fand er 1989/90 zu einer auch selbstkritischen Einstellung. Er hoffte kurz auf einen Durchbruch der Esperantobewegung in der Sowjetunion und dem Ostblock, setzte sich dann aber, nach der deutschen Einigung, für die Schaffung eines neuen Deutschen Esperanto-Bundes ein. 1991 wurde er Vorsitzender der von ihm mitgegründeten Gesellschaft für Interlinguistik.

Schlüsselwörter: Esperanto; Interlinguistik; Internationalismus; Kommunismus; DDR; Verfolgungen.

La 30an de majo 2021 Detlev Blanke iĝus 80-jara. Bedaŭrinde, li – elstara interlingvisto – jam de pli ol kvin jaroj ne plu vivas. Ni uzu la datrevenon tamen kiel okazon por memori pri lia aktivado por la Esperanto-movado.

Blanke memstude eklernis Esperanton en 1957 kaj tuj ekuzis la lingvon praktike. Tion li faris ekzemple dum aŭtomobila petveturado tra Pollando, sed precipe per korespondado. En februaro 1959 li publikigis anonceton en la revuo *Esperanto*, en kiu li jene formulis siajn dezirojn: “k.ĉ.l. kaj ĉiuj temoj, sed prefere kun ges-anoj el ekstereŭropaj landoj.” Iom post iom li kreis korespondantaron en ĉ. kvardek landoj. En intervjuo li rakontis, ke en sia “verda fazo” li posedis varbo-stampilon pri Esperanto, per kiu li ornamis ĉiujn siajn leterojn. Li rakontis ankaŭ: “Mi povintus limigi min al la nura uzo de Esperanto [...], sed mi ankaŭ volis engaĝiĝi por la ideo.”

Jam frue lin okupis la demando kiel interligi praktikon kaj teorion. Li ofte trovis nekomprenon ĉe siaj instruistoj en la lernejo kaj poste ĉe docentoj en la universitato. “Ili ofte uzis argumentojn, kiuj ne konvinkis min, ĉar, malsame al ili, mi ja konis la praktikon,” li klarigis. Tio kondukis lin al multjara scienca esplorado, kies temojn difinis, laŭ lia propra formulo, la ligo inter teorio kaj praktiko, kaj kies plej impona frukto estis lia habilitacia

tezo pri internaciaj planlingvoj. Per ĝi kaj per tre multaj artikoloj kaj libroj li komencis venki la obstaklojn en Germana Demokratia Respubliko (GDR) – ne nur la kutimajn antaŭjuĝojn kontraŭ artefarita lingvo, kiuj ne estis rezervitaj al GDR, sed ankaŭ la ideologiajn barojn, nome la postrestaĵojn de la Stalina “lingvoscienco” kaj la profundan malfidon de partiaj funkciuloj kontraŭ elmontroj de memstara internaciismo. En 1959 li komencis studi en la Universitato de Rostock pedagogion, germanan filologion kaj geografion. Dum kvar jaroj li estis fakinstruisto en supera lernejo de meklenburga vilaĝo.

Ekde 1965 la kondiĉoj por la Esperanto-movado en Germana Demokratia Respubliko (GDR) pliboniĝis, ĉar tiujare fondiĝis “Centra Laborrondo por Esperanto en Kulturligo de GDR” (ekde 1981 GDREA). Blanke tuj ekaktivis por ĝi en sia regiono. (En 1966, kiam li unuafoje, kadre de trikapa oficiala delegacio, vojaĝis al okcidento, al la Germana Esperanto-Kongreso en Bamberg, mi konatiĝis kun li.) Li translokiĝis al Berlino kaj tie en 1968 iĝis profesia sekretario de la Laborrondo. En tiu pozicio li restis dum pli ol dudek jaroj.

Same longe li redaktis la organon de la Centra Laborrondo, *Der Esperantist*. En 1976 li doktoriĝis en Humboldt-Universitato per tezo, kiu komparas la vortfaradon en la germana kaj en Esperanto. Per la dua, jam menciita disertacio, en 1985 (D. Blanke 1985), li akiris la universitatan instrurajton; ĝi aperis en prestiĝa libroserio. Ekde 1988 li estis docento en Humboldt-Universitato.

Sociologia analizo montris en 1985, ke 70% de la anoj de GDREA lernis Esperanton post 1965. La meza aĝo de la eklernintoj estis 32. Por atingi progreson, tial unue necesis mildigi la informan deficiton, kiu estiĝis en orienta Germanio pro tio, ke pli ol tridek jarojn ne eblis disvastigi Esperanton tie.

Blanke bone sciis profiti la oficialigon. Necesis ĉiama sinadaptado al la politikaj kondiĉoj kaj al aktualaj partiaj gvidlinioj, kaj pri ambaŭ taskoj Blanke ĉefe respondecis. Li estis, kiel formulis unu kunbatalinto, “la ĝusta persono kun ĝusta talento je ĝusta loko.” Helpa faktoro estis, ke Blanke akiris ankaŭ inter pli maljunaj esperantistoj kredindecon, ĉar li estis tute maltipa funkciulo – li lernis Esperanton en tempo, kiam tio tute ne promesis profesian perspektivon. Frutempa mentoro estis la masonisto Franz Tischer (†1973) en Magdeburg; fascinis lin, ke tiu tute ne privilegiita homo uzas Esperanton por sinklerigo kaj kiel fenestron al la mondo. Tischer ne simpatiis kun la reĝimo, sed montris komprenon pri Blanke, sia “Esperanto-filo.” Ĉar ankaŭ mi iom korespondis kun Tischer antaŭ proksimume kvindek jaroj, mi ilustro-cele citu el unu letero lia:

[...] se li [Detlev Blanke] volas antaŭeniĝi, li ja devas agi en la senco de la reganta atmosfero, alie li ne povas progresi. [...] Ni maljunuloj

ne povas tiom 180 grade turni, pro tio mi ne plu taŭgas por la nuna situacio. Preskaŭ ĉiuj malnovaj, iam tre aktivaj esperantistoj ne plu estas en gvidanta pozicio.

Ne mirige, la profesia avanco igis Blanke dankema al la reĝimo. Stimulis lin apud Franz Tischer, kiu estis socialdemokrato, ankaŭ la persona modelo de komunistaj esperantistoj, kiuj suferis en naziaj koncentrejoj. Ili estis homoj, kiuj volonte helpis konstrui socialismon, sed de tempo al tempo kuraĝis spiti siajn superulojn.

Kvankam Blanke ĉiam, ankaŭ esperantlingve, defendis la politikon de GDR, li bone konsciis, ke sian disvolvon la movado ne ŝuldis al desupra favoro, sed al desuba premo originanta en la deziro de homoj en fermita ŝtato eskapi limigojn kiel cenzuron kaj muron kaj uzi Esperanton kiel ligilon kun la ekstera mondo. Tiuj homoj deziris ekspluati la avantaĝojn de Esperanto en “niĉo,” kaj Blanke helpis ilin eluzi la ekzistantajn ŝancojn, zorge atentante, ke la esperantistoj ne faru ion kontraŭŝtatan, per kio povus endanĝeriĝi la fragila movada pozicio.

Dum du jardekoj Blanke, plej ofte sola aŭ nur kune kun sia estro-prezidanto, reprezentis GDR en Universalaj Kongresoj. Li iĝis internacie konata. Laŭ propra konfeso, li ŝatis la multflankan profesion vivon de funkciulo, movadano kaj sciencisto ebligita per Esperanto. Precipe en la komitat-kunsidoj de UEA li impresis per sia afereca kunlaboro kaj organiza kapablo. En tio li similis al la bulgaro Nikola Aleksiev (1909–2002), kvankam tiu estis pli ol 30 jarojn pli aĝa. Ambaŭ iom post iom iĝis kvazaŭ kunordigantoj de la Esperanto-asocioj en la socialismaj landoj. Dank’ al la prestiĝo, kiun Blanke akiris tie, li povis instigi tiujn asociojn al pli aktiva agado. Diskrete, malantaŭkulise, li skurĝis la paralizan efikon, kiun daŭre havis la neoficialigo (kaj inerto) de la movado en Soveta Unio.

Fojfoje al lia fervoro mankis ekvilibro. En sia verketo *Esperanto kaj socialismo? Pri la movado sur la “alia flanko”* (2004 kaj 2007) li pentris la rolon de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) rozkoloro. Li asertis, ke MEM ofertis eblon, kiun ne donis UEA, nome “esprimi sin pri aktualaj politikaj problemoj.” Pri la tendenca, propagandeca karaktero de MEM Blanke silentis. Li povis ankaŭ krei embarason. Li forte grumblis kontraŭ tio, ke menciigu detaloj de la subpremo de Esperanto en stalinismo. Tio konformis al la politikaj postuloj en GDR, sed estis nerealisme, eĉ nedece, atendi de okcidentaj esperantistoj kaj de UEA prisilenti la sangajn persekutojn, kiuj trafis tre grandan nombron de ordinaraj esperantistoj. Nur malfrue, fakte en la menciita verketo, li povis konfesi, ke “la persekutoj de la esperantistoj sub Stalin kvante kaj kvalite superis tiujn sub Hitler.” Tian agnoskon tra multaj jaroj komunistaj esperantistoj nur malofte pretis aŭ kuraĝis fari.

En 1989/90 kolapsis la reĝimo en GDR. Detlev Blanke bonvenigis la ŝanĝon. Li parolis pri makulitaj idealoj (“Tro da homoj estis buĉitaj en la nomo de ‘socialismo’”), ankoraŭ esperante dum iom da tempo, ke la socialismo, pri kiu li revis, per reformoj estos savebla; en 1990 li submetis novan tradukon de la Komunista Manifesto. Kiam, surprize ankaŭ por li, en Moskvo en 1990 aperis reeldono de mia verko *La danĝera lingvo*, li ligis al tio entuziasmajn atendojn: li nomis la aperon de tiu libro en Soveta Unio “simptomo por nova fundamente grava etapo en la vivo de socialismo.” Poste li aludis pri la eblo de “tria vojo,” parte sin kroĉante al utopio, parte provante ĝin revivigi. Sed la optimismo pri la perspektivoj de perestrojko baldaŭ montriĝis senbaza.

Dum progresis la germana reunuiĝo, Blanke senrezerve faris sian kontribuon al ĝi, laborante por la kunfando de la Esperanto-asocioj en orienta kaj okcidenta Germanio (majo 1991). Plurfoje li laŭdis, ke la kunigo efektiviĝis en spirito de egalrajteco. Eblis nun senĝene diskuti pri ĝis tiam tabuaj temoj, kion faciligis la serena kondukmaniero de Detlev Blanke, lia natura toleremo kaj malŝato de polemiko.

Fakte, Detlev Blanke verŝajne ne havis malamikojn. Bona ekzemplo estas lia reago al Ivo Lapenna. En ties fine tute senindulgaj kampanjoj GDR kaj Blanke okupis centran lokon. Blanke reagis je tio tre milde: li simple flankenŝovis la konspiroteoriojn de Lapenna kaj anstataŭe emfazis liajn pasintajn, grandajn meritojn por la Esperanto-movado. Sin mem li kuraĝe korektis, dirante (letero de 20-1-1991), ke liaj iamaj asertoj pri SAT (kiun komunistaj esperantistoj kutimis insulti) ne estis ĝustaj kaj ke la juĝon de Lapenna pri Soveta Unio li mise stampis “antisovetia aŭ antikomunisma.” Aliflanke, en la pensaro de Blanke restis ankaŭ kontinueco trans la reĝim-ŝanĝon. Tio evidente rilatas unuavice al liaj lingvistikaj verkoj, kiujn plej malmulte povis influi politikaj-ideologiaj vidpunktoj, sed foje ankaŭ al liaj “movadologiaj” teorioj. Li kapablis distancigi sin jen de stalinismo, jen de lingva mistikismo. Se li kritikis la sintenon de esperantistoj al la interna ideo, tio dum la ekzisto de GDR respegulis la strebadon ne allasi internaciismon konkurencon al la reganta ideologio. En 1997 Blanke revenis al la temo, nun tamen precizigante, ke li kontraŭas nur “la neseriozan babiladon pri la interna ideo,” sektismon kaj la emon atribui al la lingvo mem “iun internan mistikan kredon aŭ forton.” Li turnis sin kontraŭ “bombastajoj ridindaj kaj ridindigaj” en la Esperanto-movado. En ligo kun tio li en majo 2001 en parte satira stilo kritikis la provon starigi t.n. Esperantan Civiton (D. Blanke 2001).

Atinginte la asocian kunfandiĝon en Germanio, Blanke povis koncentriĝi al sia plej ŝatata temo, la pozicio de Esperanto en scienco. En 1991 li fondis Germanan Societon pri Interlingvistiko (GIL), kiun li prezidis ĝis 2011 kaj kies ĉiujarajn konferencojn li organizis. Internacie, li iniciatis esperantologiajn konferencojn (la unua estis en la Universala Kongreso en Varna, 1978) kaj

redaktis plurajn volumojn kun ĝiaj referaĵ-kolektoj. Dum 24 jaroj, ĝis sia morto, li redaktis po 98 numerojn de germanlingva kaj de esperantlingva informilo por interlingvistoj. Kun Humphrey Tonkin li prizorgis de 1992 ĝis 2013 la interlingvistikan sekcion en la bibliografio de la usona *Modern Language Association*. Pri la vasta gamo de liaj intereso (interlingvistiko kaj Esperantologio, lingvopolitiko, instruado de Esperanto, historio de la Esperanto-movado) atestas liaj libroj kaj multegaj artikoloj – bibliografio listigas pli ol 1200 unuojn – kaj du festlibroj aperigitaj okaze de liaj naskiĝtagoj en 2001 kaj 2011. Por mi persone bela sperto estis la intensa kunlaboro kun Detlev por *La arto labori kune* (2010), nome la ampleksa “Festlibro Tonkin,” kiu ege profitis de liaj konataj karakterizaĵoj: sistemeco, atento pri detaloj kaj laboremo. Lia tuta verkaro estis frukto de neelĉerpebla energio kaj nelaste de la ĉiama apogo, kiun donis al li lia edzino Wera, kiu estis samtempe, precipe en la kampo de terminologio, pli kaj pli ankaŭ lia koleginio; en 2006 ili kune estis premiitaj de Infoterm per la Eugen-Wüster-medalo (W. Blanke 2008, 2013). Ambaŭ multe vojaĝis, trifoje al Kubo, sed ankaŭ al Brazilo, Japanio kaj Novzelando.

Fine de majo 2016 en la Universitato de Leipzig okazis impona scienca kolokvo honore al lia 75a jariĝo, en kiu partoprenis ankaŭ la renoma usona scienc-historiisto Michael Gordin. La geedzoj poste venis al la Universala Kongreso en Nitra, Slovakio. Neniu povis imagi, ke ĝi signifas adiaŭon al Detlev Blanke. Li forpasis la 20an de aŭgusto 2016.

Bibliografio

- Bendias, T. (2011). *Die Esperanto-Jugend in der DDR. Zur Praxis und Lebenswelt sozialer Strömungen im Staatssozialismus*. Berlin: Lit-Verlag.
- Blanke, D. (1985). *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin: Akademie-Verlag.
- Blanke, D. (2001). Kiu bezonas civiton? *Esperanto* 94, 82-85.
- Blanke, D. (2007). *Esperanto kaj socialismo? Pri la movado sur la “alia flanko”* (Dua eldono). New York: Mondial.
- Blanke, D. (2020). *International Planned Languages: Essays on Interlinguistics and Esperantology*. (Edited by S. Fiedler and H. Tonkin). New York: Mondial.
- Blanke, D., & Lins, U. (Eds.), 2010. *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Blanke, W. (2008). *Esperanto – Terminologie und Terminologiearbeit*. New York: Mondial.

- Blanke, W. (2013). *Pri terminologia laboro en Esperanto. Elektitaj publikaĵoj*. New York: Mondial.
- Bormann, T. (2018). La danĝeraj lingvo-uzantoj: Kiel la sekreta servo de GDR observis esperantistojn. En Gotoo Hitosi, G. C. Kimura & J. A. Vergara (Eds.), *En la mondon venis nova lingvo: Festlibro por la 75-jariĝo de Ulrich Lins* (pp. 127-145). New York: Mondial.
- Lins, U. 2016. *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Reviziita eldono*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Wischendorf, H. 2021. *Esperanto in der DDR. Zwischen Verbot und Duldung*. Norderstedt: Books on Demand.
- Zimmer, A. 2018. *Der Kulturbund in der SBZ und in der DDR. Eine ostdeutsche Kulturvereinigung im Wandel der Zeit zwischen 1945 und 1990*. Wiesbaden: Springer.

Pri la aŭtoro

Ulrich Lins estas germana historiisto. Profesie li dum tridek jaroj okupiĝis (en Bonn kaj Tokio) pri la interŝanĝo de germanaj kaj alilandaj universitatanoj. En sia verko *La danĝera lingvo* li esploras la agojn de diktatorecaj reĝimoj kontraŭ Esperanto tra la dudeka jarcento; ĝi estas tradukita en sep lingvojn.

Retadreso: u.lins@gmx.net

About the author

Ulrich Lins is a German historian. For thirty years he worked (in Bonn and Tokyo) on academic exchange involving German and international university students. In his book *Dangerous Language*, he explores the actions of dictatorships against Esperanto over the twentieth century. His book has been translated into seven languages.

Über den Verfasser

Ulrich Lins ist ein deutscher Historiker. Er war dreißig Jahre lang für den DAAD (in Bonn und Tokio) tätig. Sein wichtigstes Buch behandelt die Haltung diktatorischer Regime gegenüber der Esperantobewegung und wurde in sieben Sprachen übersetzt (dt. *Die gefährliche Sprache*, 1988).